

VENEZUELA

STELO

Organo de VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO
33-a Jaro = N. 76 = 1-a Semestro 2005

ISSN 1316-0451

SIGNIFA PERDO POR LA VENEZUELA ESPERANTISTARO

La 28-an de februaro 2005 forpasis en Karakas unu Esperantisto, kaj la tuta venezuela samideanaro orfiĝis. Ĉi lastan vorton oni povus taksu nur figura esprimo, sed fakte ĝi enhavas apartan signifon, se oni konsideras la personecon de la forpasinto kaj lian influon sur la movadon en ĉi lando. Ne temas pri iu ajn esperantano, sed pri eksterordinara Esperantisto kiu meritas pli ol nur majusklan komencliteron.

Prof-ro Johano Eduardo Bachrich foriris por ĉiam. Ne estas mia intenco verki ĉi tie lian biografion, sed mi diros kion mi lernis pri kaj de li dum pli ol tridek jaroj de amikeco kaj poresperanta kunlaborado.

Mi konatiĝis kun li komence de la jaro 1974, apenaŭ kelkajn monatojn post mia alveno al Venezuelo. Tiam mi posedis Esperanton multe pli ol la hispanan. Mi tuj konstatis liajn eksterordinarajn homajn ecojn, krom lian gvid-talenton. Kune kun du aliaj fervoraj esperantistoj, Lino Moulines kaj Octavio de Diego, li inspiris la renaskiĝon de la movado en Venezuelo, kaj la 28-an de novembro 1972, unuafoje en la moderna epoko de Esperanto en Venezuelo, okazis estrarkunveno de Venezuela Esperanto-Asocio.

Post tiu dato nia movado konis fruktodonajn tempojn, sed ankaŭ malfacilajn momentojn. Dum multaj jaroj ni ne povis kalkuli sur propra sidejo, kaj ni devis gastigi ĉe diversaj publikaj bibliotekoj kaj privataj institucioj. Tamen ni sukcesis realigi iniciatojn por la disvastigo de Esperanto per pluraj kursoj, eventoj, naciaj renkontiĝoj, ekskursoj; eblis realigi la eldonon de grava venezuela literaturaĵo, *Doña Bárbara*; ni eniris en diversajn universitatojn. Niaj samideanoj montris grandan entuziasmon en ĉiuj aktivaĵoj. Sed malantaŭ ĉiu el ni, ĉiam statas la pasio, la entuziasmo, la sperto, la kuraĝigo de Johano. Li neniam dubis pri la celoj kaj la vojoj por ilin atingi; li ĉiam havis subtenan vorton por ni, kiam ni sentis deprimon; plurfoje, ekster la esperanta agado, li helpis per mono iun

ajn samideanon kiu kuraĝigas peti pruntedonon. Kaj, ne malpli valoran, mi rememoras lian spontanegan kapablon subteni per patrecaj konsiloj. Li estis valora organizanto kaj natura gvidanto en esperantaj aferoj; sed en la interhomaj rilatoj, li estis amiko sincera kaj dua patro por ĉiu el ni. En li ni havis imitindan kaj imitendan ekzemplon.

Antaŭ tri jaroj, danke al la senlima malavareco de Johano, Venezuelana Esperanto-Asocio akiris sian propran sidejon.

Nun, kiam fizike li jam por ĉiam forestos de ni, niaj oreloj jam ne povos aŭdi lian voĉon. Tamen, se oni silente meditas kaj rememoras lin, eblas en la koro aŭdi liajn indikojn kaj preskribojn. Li admonas kaj instigas nin daŭrigi lian senlaca laboron por la disvastigo de Esperanto en Venezuelo. Mi sentas ke ni heredis de li la ne facilan komision savi nian stagnantan movadon, kaj per persista kaj diligenta agado levi ĝin al la prestiĝa pozicio kiun ĝuis nia Asocio antaŭ kelkaj jaroj. Ĉu ni pretas akcepti la defion, aŭ ni kapablos honte kabei, tiel repagante per sendankeco la sennombrajn servojn ricevitajn?

Andrés Turrisi

VENEZUELA STELO

VENEZUELA

Apartado 47675, Caracas 1041 – A

<http://www.esperanto-ve.org>

esperanto-en-venezuela@yahoo.com

REDAKCIA KOMISIONO: Félix García Blázquez, Jorge Mosonyi,
Esperanza Pérez, Andrés Turrisi.

ELDONANTO: FUNDAESPERANTO

VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO

Apartado 47675, Caracas 1041 – A

<http://www.esperanto-ve.org>

ven_esperanto@yahoo.com

ESTRARANOJ:

PREZIDANTO: Andrés Turrisi

HONORA PREZIDANTO: Juan E. Bachrich (†)

VIC-PREZIDANTO: Jorge Mosonyi

ĜENERALA SEKRETARIINO: Esperanza Pérez

KASISTO: Esperanza Pérez (provizore)

KOMISIITOJ:

BIBLIOTEKO KAJ LIBROSERVO: Peter Jaimez.

KORESPONDAJ KURSOJ, ELDONADO, PROTOKOLADO,

VENEZUELA STELO: Andrés Turrisi.

KONSILANTOJ: Félix García Blázquez, Esteban Mosonyi,

Alfredo Portillo.

HONORA MEMBRO: Fernando De Diego

ENLANDAJ DELEGITOJ: Héctor Delgado T. (Mérida),

Alfredo Ovalles (Maracay),

Germán Montero (Maracaibo),

Jesús R. Cedeño (Maturín kaj Ciudad

Bolívar).

JUNULARAJ AFEROJ: Yuri Yakimec

ALIĜINTA ASOCIO: ZULIA ESPERANTO-ASOCIO.

ATENTIGO

Pri la enhavo de niaj artikoloj respondecas iliaj aŭtoroj.

Manke de indiko de la aŭtoro, respondecas la redakcio.

Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene re-publikigataj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton.

Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligus al ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborantojn.

NACIAJ NOVAĴOJ

La 10-an de decembro 2004, kiel jam tradicie ĉe Familio Bachrich, ni kunvenis en la Zamenhofan Vesperon por festi la naskiĝdatrevenon de nia Majstro. En la solenaĵo, karakterizita per aparte agrabla etoso, partoprenis esperantistoj kaj simpatiantoj el diversaj urboj de la Lando, kiuj pritraktis diversajn movadajn temojn kaj neformale babiladis. Ni antaŭsentis la specialan signifon de tiu evento, kiun lastfoje ĉeestis nia grandanima gastiganto: Prof-ro Johano Bachrich lasis nin kaj foriris por ĉiam de ĉi mondo la 28-an de februaro 2005.

* * * * *

Nia Vic-Prezidanto, Prof. Jorge Mosonyi, daŭrigas la kontaktojn kun la Bolivara Societo de Venezuelo, koncerne la projekton eldoni la tradukon de kvar gravaj verkoj de la Liberatoro Simón Bolívar. Nia celo estas diskonigi tra la mondo la ecojn kaj la penson de Bolívar, mirinde aktuala en nia tempo. La materialo estas jam preta, kaj post unu lasta revizio, ni faros la lastajn alpaŝojn por realigi longe karesitan revon.

* * * * *

Prof-ro Juan Negrete, gvidas Esperanto-enkondukan kaj daŭrigan kursojn de Esperanto, en la Centra Universitato de Venezuelo. Kiel jam dum la pasinta semestro, la kursojn partoprenas kontentigaj grupoj da gelernantoj. Prof-ro Negrete jam planas pliajn kursojn por la venontaj semestroj. Lia docenta agado estas iniciato de la Grupo "Esperanto-Amikaro, tamen ni fieras ĉar Prof-ro Negrete estas samtempe membro de Venezuelo Esperanto-Asocio.

INTERNACIAJ NOVAĴOJ

La ĉijara 90-a Universala Kongreso okazos en Vilnius, Litovio, de la 23-a ĝis la 30-a de julio 2005. Laŭ informoj ĉiutagaj aperantaj en la reto, la profesia kaj entuziasma laboro de niaj litovaj samideanoj atingis konkretaj rezultojn, kaj oni spiras la certecon ke la supera evento de la monda esperantismo rezultos aparte sukcesa. Sendube ni troviĝas antaŭ eksterordinara evento kiu konstituas veran defion. La jubilea ĉijara UK okazos ĝuste 100 jarojn post la 1-a Universala Kongreso de Bulonjo-ĉe-maro, Francio.

* * * * *

Inter la 30-a de julio kaj la 5-a de aŭgusto 2005, Kaunas, Litovio, gastigos la 38-an ILEI-Konferencon. La evento devus rezulti aparte sukcesa laŭ partopreno, ĉar por pluraj instruistoj kaj instruktoroj kiuj partoprenas la Universalan Kongreson, la Konferenco konstituos daŭrigon de la ĉefa jara renkontiĝo de la monda esperantistaro.

Forpasis la Ĉefpontifiko, la unua Papo ne itala en pli ol 400 jaroj, kies vere influa kaj simbola regado daŭris pli ol kvaronjarcenton. Oni lin nomis “la vojaĝanta Papo”, “la amika Papo”, “la atleto de Dio”, eĉ “Johano Paŭlo la Granda”, pro liaj multoblaj kvalitoj, kiaj energio, karisma gvidkapablo, forta personeco, strebado rilatiĝi persone kun kredantoj kaj civitanoj de la tuta mondo. Elstaris lia laboremo, lia mirinda lingvokapablo –kiu ampleksis ankaŭ Esperanton-, lia amo por la naturo, lia konstanta batalado kontraŭ malsanoj, akcidentoj, eĉ fiaskinta mortigo kiu lin serioze afekciis sed ne malfortigis spirite.

Li sukcesis plikreskigi la katolikan eklezion, konservante ĝian unuecon, li influis gravajn politikajn okazaĵojn kaj la mondan publikopinion, li alproksimigis katolikismon al ĉiuj aliaj religioj, reliefigante iliajn komunajn sopirojn je pli bona mondo, kie regos la paco kaj la homaj rajtoj estos plene respektitaj.

Nun malfermiĝas alia periodo. De post kelkaj tagoj ni havas novan Papon. Kompreneble abundas konjektoj pri la direkto kiun li donos al la eklezio. Ene de la kardinala kolegio ekzistas pluraj tendencoj, ekde la plej konservemaj ĝis la plej renovigaj. La diverseco ŝuldighas al la origino de la kardinaloj, inter kiuj multaj devenas de la Tria Mondo, formante heterogenan kadron kiu estigas transformojn, laŭmezure de la rapida evoluo de multobla mondo troviĝanta en konstanta bolado. Spite al tiu diverseco, eblis atingi la necesan plimulton kiu elektis la novan Papon.

Laŭ nia vidpunkto la nova Papo devos daŭrigi la laboron de spirita pligrandigo komencita de Johano Paŭlo II-a, disde aliaj anguloj same gravaj kiel la ekstera kreskado de la eklezio. Ni aludas la internajn transformiĝojn kiujn necese devos sperti la katolikismo por plene harmonii kun la spirito de nia tempo. Ekzemple, la sincera kaj malferma pridiskuto de esencaj doktrinaj demandoj kiaj la fraŭleco, la rolo de virinoj en la religia vivo, la aborto, la eŭtanazio kaj aliaj ligitaj temoj. Aliflanke, la urĝa rekomenco de diskutado pri la socipolitikaj sistemoj kiuj konvenas al la hodiaŭa mondo, kaj la struktura superado de malriĉeco, por kio necesas repreni la postulatojn de la “teologio pri liberigho”, disvolvita precipe en Latinameriko sub la impulso de la Dua Vatikana Koncilio, kaj kio esence estas la socia doktrino de la katolikismo adaptita al nia epoko. La estonteco de la plej potenca kaj vasta eklezio de la mondo dependos grandparte de la sincero, fervoro kaj profundo per kiu oni pritraktos la menciitajn temojn. En nia epoko, karakterizata per globala komunikiĝo kaj senlima dinamismo, ne eblas limigi sin al eternaj kaj senŝanĝaj veraĵoj.

Jorge Mosonyi

Eldiroj de Simón Bolívar:

Forkuru de la Lando kie unu sola kontrolas ĉiujn Povojn: ĝi estas lando de sklavoj.

(2-an de januaro 1814)

La bonaj moroj kaj ne la forto estas la kolonoj de la leĝoj; kaj la praktiko de la justico estas la praktiko de la Libereco.

(Diskurso de Angosturo
15-an de februaro 1819)

MENSAJE DIRIGIDO A LOS ESPERANTISTAS Y SIMPATIZANTES VENEZOLANOS

Queridas amigas, Estimados amigos del Esperanto,

La finalidad de la Asociación Venezolana de Esperanto es promover la divulgación del Esperanto en nuestro País y dar a conocer los valores de nuestra cultura, historia y costumbres en el mundo entero por medio del Idioma Internacional.

Es obvio que, para lograr estos objetivos, la Asociación necesita la colaboración de sus miembros y simpatizantes, y es por eso que les pedimos se hagan miembros de la Asociación y/o de la Fundación Cultural Esperanto (FUNDAESPERANTO).

El propósito de FUNDAESPERANTO es desarrollar actividades culturales relacionadas con el Esperanto, y recabar fondos para el financiamiento de la sede y las actividades de la Asociación.

CUOTAS ASOCIATIVAS PARA EL AÑO 2005

1.- ASOCIACION VENEZOLANA DE ESPERANTO:

MIEMBROS ACTIVOS (MA):

- Una (1) cuota anual de Bs. 70.000 ó
- Dos (2) cuotas semestrales de Bs. 38.000 ó
- Cuatro (4) cuotas trimestrales de Bs. 20.000

ESTUDIANTES Y FAMILIARES (E/F) DE LOS MA:

- El 50% de la cuota para los MA

MIEMBROS PATROCINANTES (MP):

- Además de la cuota AM pagan Bs. 7.000 mensuales

ESPERANTISTAS DEL INTERIOR U OTROS AMIGOS DEL ESPERANTO:

- Una (1) cuota anual voluntaria de no menos de Bs. 35.000

2.- FUNDACION CULTURAL ESPERANTO (FUNDAESPERANTO)


Una (1) cuota única anual de Bs. 60.000

Los miembros honorarios no cancelan cuota alguna.

IMPORTANTE: Las cuotas asociativas podrán pagarse:

- a) directamente a la Tesorera de ambas instituciones, Sra. Esperanza Pérez
- b) con depósito en la Cuenta Corriente N° 01380020130200004778 del Banco Plaza *, para la Asociación Venezolana de Esperanto
- c) con depósito en la Cuenta de Ahorro N° 0105-0659-02192-3 del Banco Mercantil*, para la Fundación Cultural Esperanto *

*** Favor informar al teléfono 0212 = 283.65.72 el número del comprobante de depósito, la cuenta bancaria, el monto y el nombre del depositante.**





RECORDANDO AL SEÑOR BACHRICH

En este momento de gran tristeza, como ocurre ante las despedidas definitivas, queremos rendirle un homenaje al Señor Juan Eduardo Bachrich, quien fue nuestro miembro fundador, asesor permanente, directivo por muchos años, centro y motor de nuestra Fundación.

¿Quién era el Señor Bachrich? Era una persona sin igual, de una inteligencia profunda. Su don de mando y su capacidad de dirigir eran admirables. Todos los planteamientos los hizo con mesura y respeto por la opinión ajena, bases fundamentales de la caballerosidad y del saber vivir. El señor Bachrich no era de esas personas que pasan sin dejar recuerdo, siempre proyectó lo mejor de sí mismo, sabía llegar a todos y ganarlos a su afecto, porque era puro corazón. De ahí que sus amigos fueran legión, que no debió tener conocidos. Los conquistaba de inmediato con su sencillez y su don de gentes.

Su amor a la verdad cinceló en él una personalidad vigorosa, era tenaz hasta la porfía, no desmayaba ante las dificultades. Su rectitud y su conducta fueron la admiración de quienes tuvimos el placer de estar a su lado.

Se nos fue el señor Bachrich, pero su legado, su ejemplo y su espíritu continúan estimulándonos, dándonos bríos para seguir muchos de sus sueños, de sus ilusiones y de sus proyectos.

NOTICIAS FUNDAESPERANTO

El 16 de abril de 2005 se efectuó la Asamblea General Ordinaria correspondiente al ejercicio comprendido entre el 1º de abril de 2004 y el 31 de marzo de 2005.

Se presentaron para el análisis y consideración de la Asamblea:

- El informe de gestión
- Los estados financieros
- El informe del Comisario

los cuales fueron aprobados por unanimidad. Igualmente fue tratada la vacante del cargo de vocal de la Junta Directiva que desempeñaba el señor J.E. Bachrich. Se nombró para este cargo al Dr. Pedro Jajmes.

La Junta Directiva

LA KONSTITUCIO DE LA BOLIVARANA RESPUBLIKO DE VENEZUELO: Prezentaj vortoj

Jorge C. Mosonyi

La nuna Konstitucio (1999) de la Bolivarana Respubliko de Venezuelo estas konsiderita kiel la plej progresinta de la politika historio de nia lando el multaj vidpunktoj, precipe je la kampo de homaj rajtoj, kaj iis pristudinda kaj ĝisfunde analizinda modelo laŭ internacia skalo. Krome, ĝi estas la ununura konstitucio ellaborita de popole elektita Nacia Konstitucia Asembleo -kiu laboradis dum la jaro 1999 kune kun la plej diversaj sektoroj de la nacia vivo je ĝia redaktado-, kaj kiu estis aprobita pere de nacia referendumo, okazinta en decembro de la sama jaro.

Ĉi sube ni prezentas, en esperanta versio, la Antaŭparolon de nia Konstitucio, kiu esprimas en mirinda sintezo la celojn kaj aspirojn, la valorojn kaj idealojn kiuj devas gvidi la reorganizado de la venezuela socio, fariĝante en si mem kvazaŭ humanisma manifesto je universala amplekso.

KONSTITUCIO DE LA BOLIVARANA RESPUBLIKO DE VENEZUELO Decembro 1999

ANTAŬPAROLO

La Venezuelana popolo, ekzercante siajn kreivajn povojn kaj invokante la protekton de Dio, la historian ekzemplon de nia Liberiginto Simón Bolívar kaj la heroecon kaj sinoferon de niaj aborigenaj antaŭuloj kaj de la iniciatintoj kaj kreintoj de libera kaj suverena patrolando;

kun la supera celo refondi la Respublikon por starigi socion demokratian, partoprenan kaj protagonisman, multetnan kaj plurkulturan en Ŝtaton justecan, federalan kaj malcentralizitan, kiu firmigu la valorojn de sendependeco, paco, solidareco, komuna bono, teritoria integreco, kunvivado kaj regado de leĝo por tiu ĉi kaj la venontaj generacioj; sekurigu la rajton al vivo, al laboro, al kulturo, al edukado, al socia justeco kaj al egaleco sen ia diskriminado aŭ subordigo; antaŭenigu pacan kunlaboron inter la nacioj, kaj impulsu kaj firmigu la latinamerikan integriĝon laŭ la principo de neinterveno kaj memdecido de la popoloj, la universalan kaj nedivideblan garantiadon de la homaj rajtoj, la demokratiigon de la internacia socio, la nuklean malarmiĝon, la ekologian ekvilibron kaj la mediajn jurajn posedaĵojn kiel komuna kaj nerezignebla heredaĵo de la homaro;

ekzercante sian originan povon reprezentitan per la Nacia Konstitucia Asembleo pere de libera voĉdono kaj en demokrata referendumo,

dekretas la jenan

KONSTITUCION

SIMFONIOJ DE BEETHOVEN

Jorge C. Mosonyi

Ĉi-jare (2005) la mondo solenas la duan jarcenton de la publika prezentado de la Tria Simfonio (“Heroeca”) de Ludwig van Beethoven, ĝenerale konsiderita kiel nediskutebla elmonro de la stila maturiĝo de la Bonna geniulo. Tiu ĉi verko estas kulmina punkto de la muzika klasikismo, kaj samtepe malfermas la pordojn al la romantikismo kaj al ĉiuj pli freŝaj navigaĵoj de la okcidenta akademia muziko. Kiel sciante, Beethoven dediĉis ĝin al la granda Napoleono Bonaparto, vidante en li la personigon de la idealoj de la franca revolucio, kaj poste li pentis pri tio kiam li eksciis ke Napoleono sin proklamis imperiestro.

La naŭ simfonioj de Beethoven formas kune la plej mirigan muzikan heredaĵon kiun iu ajn komponisto postlasis al la homaro. Krom la perfekteco, elstaras en ili la varieco, ĉar ĉiu havas sian propran “personecon”, ĉiu estas iuspeca aparta mondo kiu transcendas sian kreinton. La simfonia universo de Beethoven estas pli varia kaj diversa ol tiu de iu ajn konita komponisto; fakte la simfonioj de la ceteraj universale admiritaj kreintoj similas pli inter si laŭ stilo, temoj, etoso, harmonia konstruo kaj ĝenerala konceptado.

Mi klopodos konkretigi iomete tiun ĉi formuladon pere de la sekvonta kompara tabeleta, kiu resumas unuvorte tion kion mi persone konsideras plej elstara je ĉiuj ĉi muzikaj juveloj de Beethoven:

Unua simfonio:	La plej tradicia
Dua simfonio:	La plej optimisma
Tria simfonio:	La plej revolucia
Kvara simfonio:	La plej romantika
Kvina simfonio:	La plej klasika
Sesa simfonio:	La plej bukolika
Sepa simfonio:	La plej dioniza
Oka simfonio:	La plej ludema
Naŭa simfonio:	La plej ambicia

Antaŭ proksimume du jaroj UNESKO deklaris la naŭan simfonion universala netuŝebla kulturheredaĵo, pro ĝia grandeco, splendo, kaj ĝia mesaĝo pri paca kunvivado direktita al la tuta homaro. Ĝi estas la unua muzika verko kiu ricevas tiun ĉi distingon, kaj mi plene konsentas. Tamen mi pensas, ke estintus preferinde inkludi en la decidon la tutan kolekton de la Beethovenaj simfonioj, ĉar ili povas esti konsiderataj kiel nedisigebla glora bloko, samtempe ununura kaj multobla.

MENSA EKZERCO POR ESTRARANOJ DE UEA KAJ LANDAJ ASOCIOJ

Oni imagu ke kelka Ministerio pri Edukado de eŭropa lando decidu ke oni enkondukos Esperanton en publika instruado dum unu jaro, kaj fine de tiu tempo oni analizos la rezulton de tiu instruado.

Eble, tio kaŭzos grandan emocijon kaj reciprokajn gratulojn en la movado. Sekve, la Ministerio nomos komisionon de du aŭ tri profesoroj kun la misio lerni la lingvon kaj redakti la koncernen informon je la fino de la jaro.

La informo estos senpartia kun iu parto laŭda kaj la alia mallaŭda, t.e. indikante la avantaĝojn kaj malavantaĝojn. Por la motivo de ĉi tiu ekzerco, nur la mallaŭda interesos nin. Jen ĉi lasta imagita raporto kune kun decido:

“ En via propono por la enkonduko de la lingvo vi emfazis ke ĝi estas tre simpla kaj facila, kaj ke la gramatiko konsistas el nur 16 reguloj sen esceptoj kaj aliaj kvalitoj.

1 - Nu bone, nia komisiono konstatis ke la kvanto da reguloj estas pli ol 16, kiel oni povas vidi tra la legado de la verko Plena Analiza Gramatiko de Esperanto kun tiom da paĝoj preskaŭ egalaj al tiuj de ajna nacia lingvo kiujn ni instruas en niaj liceoj.

2 - Tiuj reguloj havas esceptojn:

a - “Ne ekzistas artikolo nedefinita”, tamen oni uzas numeralon “unu” por tiu funkcio, laŭ ekzemplo de la fundamenta ekzercaro: “unu vidvino havis du filinojn”

b - Ne ĉiuj substantivoj finiĝas per “-o” ekzemple: “Maria” kaj aliaj virinaj nomoj.

c - Ekzistas adjektivoj kiuj finiĝas ne per “-a” sed alimaniere, nome la serioj de “iu” kaj “ies”, kaj kiel individua ekzemplo la vorto “ambaŭ”

d - Ne ĉiuj adverboj finiĝas per “-e”, ekzemple, “baldaŭ, hodiaŭ” ktp Plie, oni aljuĝas al la adjektivo en certaj okazoj la adverbajn finaĵojn “-e”, kio kontraŭas la principon de neŭtraleco, ĉar en la okcidentaj lingvoj kiujn ni publike instruas ne ekzistas analoga anomalia, kaj ankaŭ staras kontraŭ la proklamita propedeŭtika karaktero de Esperanto.

e - Iu el gramatika regulo deklaras ke ĉia prepozicio havas difinitan signifon, sed ni trovis ke laŭ PIV la prepozicio “de” havas pli ol dek signifojn.

3 - La gramatika nomenklaturado kaŭzas konfuzon en la lernantoj, kaj oni trovas terminojn kiuj ne havas ekvivalentojn en la fremdaj lingvoj kiujn ni instruas en niaj institutoj. Ekzemple: “adjekto”, “subjunkcio”, “gramatia karaktero de radikoj”. “rekta vortefiko” kaj aliaj. Ni plene konscias ke la nomenklaturado de nacilingvaj gramatikoj, ne estas perfektaj, sed pro didaktikaj motivoj konvenas ke ekzistu ia harmonio ĉe la komparo de ambaŭ nomenklaturadoj.

Pro tiuj nekontentigaj aspektoj de la lingvo Esperanto, ni decidis ĉesigi ties instruadon.”

La demando estas, kion oni devas respondi al la koncerna ministerio, aŭ kiujn proponojn oni povas fari al la aŭtoritato por ke ĝi revidu la decidon?

LA LIBROVENDISTO

Julio Garmendia
Elhispanigis: Víctor Sirvent

Bonegajn ideojn, belegajn intencojn vi havas - la librovendisto flustris kvazaŭ parolante al si mem, kiam li donis al mi la libron kiun mi elektis. Mi kutimas aĉeti iun libron (sed nur unu, ne pli) en la plej malproksimaj kaj mizeraj librovendejoj, kiujn mi trovas en mia vojo.

-Bonegajn ideojn, jes, jes, sendube -li ripetis rigardante min rekte al la okuloj.

Tiam mi rimarkis la viron kiu parolis tiel, iun librovendiston. Laŭ mia opinio li estis ega strangulo. Li montris siajn flavajn librojn en iu ruina loko kiu alpartenas al pasinta epoko, en malnovaj kvartaloj kun multaj sinuaj kaj mallumaj stratetoj. Tra ili, la hazardo kelkfoje gvidas min, kvazaŭ prenante mian manon, ĝis la pordo de iu falinta kaj nostalgia preĝejo je perpleksiga malnoveco... aŭ ĝis iu nekutima kaj arkaika meti-art-ateliero... aŭ ĝis iu kurioza neverŝajna butikino mastrumata de iu neverŝajna butikisto. Ŝajnis ke li statas tie ekde nememoreblaj tempoj. Mi ne povis certe diri ĉu la libroj kaj la ŝrankoj prenis sian aspekton el la malnovaj kaj ruinaj muroj aŭ ĉu la muroj prenis ion el la ŝlifataj kaj multfoje legitaj libroj. Mi demandis al li pri kio li parolas kaj kial li parolas tiel. Li respondis:

-Vian fizionomion, vian mienon, viajn grimacojn, vian aspekton mi observis antaŭ ol mi donu al vi la ekzempleron. Ŝajnas al mi ke vi estas honestulo kaj kompatemulo. Ĉefe kompatemulo! oni devas esti kompatema -li rimarkis pasie, prenante mian manon-. Oni devas esti kompatema kun la kompatindaj uloj kiuj vivas senkonsole tra la paĝoj de la libroj... Ekzemple tiuj kiujn vi tenas nun en viaj manoj. Ĉu vi scias, sinjoro, la sindevigojn kiujn akiras la posedantoj de la verkoj de tiu ĝenro? Vi kontrolas estaĵojn, geulojn, vivojn, kiujn neniu konis. Kaj ilia estonteco dependas nur de via volo. Ĉu vi scias ke ili suferas bezonojn, maltrankvilon, zorgon, doloron, malĝojon?

Dirante tion, li iris kaj venis inter la libroŝrankoj. Li agis kvazaŭ li okupiĝus pri klientoj aŭ aliaj uloj, kiuj laŭ mi ne ekzistis.

-Ĉi tie -li diris al mi, konfidece, tuje ĉesante siajn grimacojn- ĉi tie, sinjoro, vi trovos min, preskaŭ certe ĉiutage, inter herooj, roluloj, kiel vi povas vidi ... -Sed mi ne estas nur librovendisto, kiel oni povas pensi -li tuj diris-. Nek mi estas librokolektanto, bibliotekisto, libro-ĉamatoro, bibliofilo aŭ libromaniulo. Mi eĉ ne estas intelektulo, "inteligentulo", aŭ legemulo. Ne, ne, tute ne. Simple, mi akceptas apud min la plej grandan kaj eblan kvanton de tiuj malfeliĉuloj kiuj troviĝas en la malhela profundeco de la libroj. Mi donis al ili mian komprenon kaj mian solidarecon. Kaj ankaŭ mi klopodas doni al ili mian helpon, laŭ mia ebleco. Sed mi faras tion bonvole, ĉefe bonvole! Mi nur estas

homo konscia pri la malfeliĉo de la aliuloj. La misfortuno de la aliuloj kortuŝis min tiel ke mi ploris aŭdante pri iliaj misfortunoj...

Mi pensis menciigi al li ke jam ekzistas en la mondo multaj veraj konsolidaj misfortunoj antaŭ ol konsideri la nerealajn malfeliĉojn kiuj nur ekzistas en la libroj. Sed li daŭrigis en sia parolado, atendante nenian respondon miaflanke.

-Sinjoro, mi ne rajtas kaŝi ĝin, kaj mi diros tion rekte: Mi ĉefe maltrankviliĝas pri iuj etaj kaj negravaj roluloj en la libroj. Ili eĉ tenas min sendorma dum la noktoj... Tiuj roluletoj kiuj pene aperas tra la tramoj de la verkoj, la longaj paragrafoj, la senfinaj ĉapitroj, la harstarigaj monologoj ... kaj por kiuj estas precipe verkitaj la paĝoj de hororo, angoraj scenoj, teruraj situacioj kaj malbonaj finoj. Ĉu oni ne devas iam ĉesigi tiujn maljustajn situaciojn? Sinjoro, sincere diru al mi: ĉu iam oni ne devas ankaŭ fari ian urĝan verkon pri savo kaj liberigo de tiu sengarda kaj mensmalsana infaneco kiu moviĝas inter la linioj de la novelaĉoj, felietonoj, melodramoj kaj bildstrioj?. Tiu bona ideo: akuŝejoj uzotaj de la needziniĝintaj graveduliinoj, kiuj estas en preskaŭ ĉiuj rakontoj.. Ĉi tie, alia ideo: kooperativo por doni al la malsat-viktimoj en la literaturo bonajn, abundajn, sanajn kaj mal-multekostajn manĝaĵojn... Ĉu tiuj proponoj ne trovas tuj la helpon kiun ili meritas? Ne malpli bezonataj estas la gastejoj por la maljunuloj kiujn ni kutime trovas en la romanoj. Tiel ili pasigos siajn lastajn tagojn trankvile. Sinjoro, ne estas vortoj por sufiĉe defendi la mizerulojn kiujn oni trovas en la mallongaj rakontoj aŭ ĉesigi la ekscesojn kiuj superabundas en la longaj rakontoj... Oni trovas sur la paĝoj de tiaj rakontoj multnombrajn malfeliĉajn kaj sendefendajn ulojn, kiuj estas puŝitaj preskaŭ ĉiutage al la malplibonaj abismoj de la krimo, la malvirto aŭ la delikto. Kiomaj inter tiuj roluletoj estas kondukitaj paŝon post paŝo -aŭ linion post linio- al tiaj malfacilaj situacioj -stretaj ravinoj de la destino- kies nura liberigo estas la suicido? Ĉiujn, la aŭtoro kiu kreis ilin, gvidas paŝon post paŝo, folion post folio, kaj subite akcelas ilin en nesolveblajn konfliktojn kiujn la aŭtoro mem faris inteligente kaj subtile ekde la antaŭaj ĉapitroj. Aliaj -multaj aliaj- estas jetataj al la fundo de la malliberejo -pro ne klaraj kaj ne bone pristuditaj kaŭzoj, sinjoro! Tie, ili suferas kaj langvoras dum longaj jaroj, atendante ian justecon kaj iun reĝustigon, kiu nur malofte aperas timide en la lastaj linioj de la lasta ĉapitro...

Mi perplekse aŭdis tion kaj sen diri vorton (ĉar mi volis kontraŭdiri nenion al tiu stranga kaj amuza ulo kaj libreska filantropo). Ŝajnis ke li mem vols liberigi min el mia ĝeno. Mi vidis lin subite malproksimiĝi inter la superŝargitaj, aŭ la troplenaj, libroŝrankoj. Verŝajne, li malproksimiĝis respondante iun alvokon. Li pasis vigle tra la libromontetoj kiuj staris sur la planko. Oni povas diri ke li atendas estontan ordigadon sur la plenaj libroŝrankoj. Fine li malaperis el mia vido, malantaŭe - aŭ mi ne scias ĉu ene- de iuj libroŝrankoj, kiujn mi ne bone povis vidi ĉe la malluma angulo, kie ili staris.... Libroŝrankoj pri "Humoro", laŭ la anonctabulo kiu estis legebla supre.

INSTRUKCIOJ POR STREĈI LA HORLOĜON

Jorge C. Mosonyi

Tie en la fundo kuŝas la morto, sed ne timu. Tenu la horloĝon per unu mano, prenu per du fingroj la streĉilon, turnu ĝin milde. Nun malfermiĝs alia lim-tempo, la arboj etendas siajn foliojn, la boatoj konkure navigas, la tempo kvazaŭ ventumilo pleniĝas je si mem kaj el ĝi ekestas aero, teraj brizoj, ombro de virino, parfumo de pano. Kion pli vi volas, kion pli vi volas? Ligu ĝin tuj al via pojno, lasu ĝin bati libere, imitu ĝin sopirante. La timo rustigas la ankrojn, ĉio kion oni povintus atingi kaj estis forgesita korodas la vejnojn de la horloĝo, gangrenante la malvarman sangon de ĝiaj rubenoj. Kaj tie en la fundo kuŝas la morto se ni ne kuras kaj alvenas antaŭe kaj komprenas ke jam ne gravas.

Julio Cortázar (1914-1984)
(Fragmento de: *Historias de cronopios y de famas*, 1962)